Schritt 4: Vom Rechner werden, zunächst basierend auf subjektiven Schätzwerten, Wahrscheinlichkeiten p(E(x)) der Leistungsdispositionen berechnet (Anwendung der Entscheidungslogik.) Es entsteht parallel ein Graph der Grobstruktur eines Diagnostikprogramms mit der Richtung „vom Symptom zur Leistungsdisposition".

Schritt 5: Der „Therapeut" entwickelt im Sinne der didaktischen Programmierung ein Übungsprogramm, das konsequent auf der Grobstruktur des Diagnostikprogramms aufbaut.

Schritt 6: Ein Lernender, der in seinen Leistungen typische Symptome zeigt, deren Entstehungsgründe durch die Untersuchung erkannt wurden, erhält zur „Therapie" das entwickelte Übungsprogramm zur Bearbeitung auf einem PC.

Im Ergebnis dieser Forschungen – die einen langen Atem brauchten, den wir uns auch zu verschaffen wussten – wurden den oberen Schulbehörden und den beteiligten Schulen Ausdrucke übergeben, die in komprimierter Form die häufigsten Fehler beschrieben, die in schriftlichen Orthografie- und Mathematikarbeiten bei bestimmten „schwierigen" Aufgabentypen (z. B. Sachaufgaben) als typische Symptome für charakteristische Könnenslücken („Fehldispositionen") der Schüler aufgetreten waren. Derartige Informationen bedeuteten für die Praxis eine von Lehrern und Fachberatern gern genutzte Hilfe. Ich übernahm seinerzeit die Aufgabe, den Bereich „Schülerleistungen im Fach Mathematik der Klassenstufen 2-4 beim Lösen von Sachaufgaben" zu bearbeiten und konnte so wieder in enger Verbindung mit der praktischen Didaktik bleiben.

Zum Forschungsbereich „Diagnostik" und zur um 1990 noch nicht voll abgeschlossenen Methodik möchte ich zusammenfassend feststellen:

- Die erfolgreiche Anwendung der Modellierungsmethoden, insbesondere der Prädikaten- und der Entscheidungslogik (Schritte 3 und 4), auf pädagogische Sachverhalte (Schritte 1, 3, 5, 6) entsprach weitgehend der methodischen Programmatik der kybernetischen Pädagogik, zumal sie als Voraussetzung für die Anwendung der Rechentechnik im Forschungsprozess (Schritte 2 und 4) diente. Insofern scheint es berechtigt davon zu

sprechen, dass in den skizzierten Untersuchungen die Funktion der Kybernetik, thematisch und methodisch eine Brücke zwischen den Naturwissenschaften und den Geisteswissenschaften zu bilden, deutlich zur Geltung kam.

- Die mit Hilfe dieser Methodik entstehenden Objektivationen haben zweierlei Gestalt und Funktion:

a) Rechnerprogramme zum Zwecke der Leistungsdiagnostik; das heißt, in Teilen wurde das Diagnostizieren als Teilprozess der Unterrichtsführung (s. Bild 1) in Rechnerprogrammen objektiviert (bes. Schritt 4), womit zugleich eine interessante Version der Psychostruktur-Komponente der Formaldidaktiken entstand, wie sie Frank beschrieb (Frank 1972, S. 9-32).

b) rechnerpräsentierte Übungsprogramme (Schritte 5 und 6) als Mittel objektivierten Lehrens bzw. Übens (insofern gibt es eine enge Verbindung zum ersten Forschungsbereich).

3. Spieltheorie

Der dritte Forschungsbereich, der meinen Platz in der kybernetischen Pädagogik bestimmt, soll hier nicht Gegenstand einer längeren Betrachtung sein, obwohl ich mich, auf Grundlage der Arbeiten Horst Kreschnaks (1985, 2007) zur Anwendung der Entscheidungslogik bei der Entwicklung von Diagnose-Therapie-Modellen, mit dem Schritt zur Spieltheorie auf ein Gebiet wagte, über dessen didaktische Relevanz nach meiner Kenntnis bisher kaum publiziert wurde. Ich freue mich deshalb darüber, dass ich in dieser Zeitschrift bereits drei Beiträge veröffentlichen konnte – nun schon lange nach Beendigung meiner beruflichen Tätigkeit.

Resümee

Es war für mich ein gutes Gefühl, dass ich kurz nach der Friedlichen Revolution Vorträge in Schwäbisch Gmünd und Regensburg halten sowie einen Beitrag in „Mathematische Unterrichtspraxis" (Karl 1991) über unsere Arbeiten zur Diagnostik veröffentlichen konnte – scheinbar unbedeutende Ereignisse, an die ich aber gerade jetzt, 20 Jahre später, gern zurückdenke. In lebendiger Erinnerung bleiben mir ebenso die Tagungen, an denen ich, gemeinsam mit Professor Heinz Lohse aus Leipzig, nach 1990 zum Beispiel in Paderborn, Berlin, Prag aktiv teilnehmen durfte. Auch in dieser Hinsicht habe ich Professor Helmar Frank viel zu verdanken. Zurückblickend möchte ich deshalb zum Ausdruck bringen, dass ich mich, mit der klassischen Didaktik im Gepäck, in der jahrzehntelangen Arbeit auf dem Gebiet der kybernetischen Pädagogik stets bereichert fühlte – nicht nur durch neu gewonnene Erkenntnisse und Sichtweisen, sondern auch durch wertvolle Begegnungen und Gespräche mit Fachkollegen aus Ost und West.

Schrifttum

Frank, H.: *Kybernetische Pädagogik.* In: Information und Kommunikation (Sonderdruck). Referate und Berichte der 23. Internationalen Hochschulwochen Alpbach 1967. Hrsg.: S. Meder, S. J. Schmidt. R. Oldenbourg, München-Wien 1968, S. 112.

Frank, H.: *Zum Stellenwert der Formaldidaktiken im Programm der kybernetischen Pädagogik.* In: Institut für Kybernetik – FeoLL (Hrsg.): Formaldidaktiken. 1. Paderborner Werkstattgespräch 1971.Hannover, Schroedel, 1972.

Frank, H.: *Interdisziplinarität als Kernerfordernis (nicht nur) kybernetischer Wissenschaftsrevision.* In: Fuchs-Kittowski, K: & Piotrowski, S. (Hrsg.): Kybernetik und Interdisziplinarität in den Wissenschaften. trafo verlag, Berlin 2004.

Karl, K.: *Über das Verhältnis zwischen Unterrichtsführung und objektiviertem Lehren.* Deutsches Pädagogisches Zentralinstitut, Berlin 1969 (Diss.)

Karl, K.: *Typische Fehler beim Lösen von Sachaufgaben* (2). In: „Mathematische Unterrichtspraxis", 12. Jg., Hefte 3 u. 4/1991.

Karl, K.; Lohse, H.: *Brücken zwischen Inseln – Beziehungen zwischen Schwerpunkten bildungskybernetischer Forschung im Westen und Osten Deutschlands vor 1990* (Teil 2). In GrKG(H), Heft 3/2000.

Karl, K.: *Dresdner Ansatz zur logisch-mathematischen Modellierung pädagogischer Entscheidungsprozesse. Abschluss und Höhepunkt bildungskybernetischer Forschung in der DDR.* In: Dittmann, F.; Seising., R. Hrsg.): Kybernetik steckt den Osten an. Aufstieg und Schwierigkeiten einer interdisziplinären Wissenschaft in der DDR. trafo verlag, Berlin 2007, S.383-397.

Kreschnak, H.; Karl, K.: *Dresdner Ansatz zur logisch-mathematischen Modellierung diagnostischer und therapeutischer Aktivitäten im Unterricht.* In GrKG(H), Heft 1/1996.

Kreschnak, H.: *Computergestützte Analysen von Schülerleistungen.* Volk und Wissen Volkseigener Verlag, Berlin 1985.

Kreschnak, H.: *Rationales Entscheiden in Geschichte und Gegenwart.* Teil 2: Rationales Entscheiden heute und in naher Zukunft. Peter Lang Europäischer Verlag der Wissenschaften. Frankfurt am Main 2007, S. 115 ff.

Landa, L. N.: *Kybernetik und Unterrichtstheorie.* In: Mathematik und Physik in der Schule. 10(1963), Hefte 2 und 3.

Richter E. O.; Hinze, K.; Karl, K.; Petry, I.: *Großversuch Programmierter Unterricht. Abschlussbericht.* In: Deutsches Pädagogisches Zentralinstitut (Hrsg.): Pädagogische Wissenschaft und Schule. Jahrbuch, Jahrg. II/1969. Volk und Wissen Volkseigener Verlag, Berlin 1969, S. 7-283.

Weltner, K.: *Meine Arbeit in der Kybernetischen Pädagogik.* In: GrKG(H), Heft 3/2010.

Eingegangen am 2010-10-21

Anschrift des Verfassers:
Dr. paed. Klaus Karl, Schützenhofstr. 17, D-01129 Dresden

grkg / Humankybernetik
Band 51 · Heft 4 (2010)
Akademia Libroservo / IfK



Eva POLÁKOVÁ

Naskiĝis en 1947 en Nitra (Slovakio), en 1971 magistriĝis en tiea pedagogia fakultato pri matematiko kaj fiziko. Ŝi specialiĝis pri uzo de modernaj didaktikaj periloj, en 1989 doktoriĝis (PaedDr.) pri didaktiko de fizik-instruado, post studado de klerigteknologio ĉe profesoro Miloš Lánský ŝi akiris en 1996 sciencan titolon „doktoro" (PhD). Sekvis habilitiĝo pri pedagogiko en 1999, profesoriĝo ĉe AIS San Marino (OProf.) pri komunikadkibernetiko en 2002 kaj eksterorda profesoreco pri amaskomunikiloj ĉe la universitato en Trnava. Krome ŝi estas honora profesorino de la Universitato L. Blaga en Sibiu (Rumanio).

Ŝi testis novajn instrumetodojn por la Slovaka Akademio de Sciencoj, ekde 1987 laboris en la Pedagogia Esplorinstituto en Bratislava kaj publikigis siajn esplorrezultojn en diversaj fakrevuoj. Krome ŝi redaktis la revuon „Učebné pomôcky" (instruhelpiloj) kaj ekde 1993 estis ĉefredaktorino de la fakrevuo „Klerigteknologio". Ŝi specialiĝis al esploro pri rilatoj inter klerigteknologioj, komunikadperiloj kaj pedagogio el la vidpunkto de komunikaj procezoj en multkultura socio.

En la jaroj 1992-2004 ŝi laboris en la Konstantin-universitato en Nitra (SK), unue kiel estrino de la katedro pri romaa kulturo, poste kiel estrino de la Instituto pri klerigteknologio. Ekde 2002 ŝi estas profesorino en la Universitato de Trnava, kie ŝi momente instruas sur ĉiuj ŝtupoj de universitata studado kaj prizorgas doktoriĝantojn en la kampo de amaskomunikila studado.

Poláková estis gvid- aŭ kunaganto en deko da naciaj kaj internaciaj esplorprojektoj (VEGA, KEGA), prelegas en pluraj eŭropaj universitatoj, estas aŭtorino, kunaŭtorino kaj eldonistino de pluraj libroj, 12 monografioj kaj ĉ. 150 artikoloj kaj studoj. Speciale ŝi esploras problemaron de Romaoj rilate al mediaj kaj sociaj stereotipoj, ŝiaj esplorrezultoj registriĝis en eŭropa publikad-databazo (ERO Base) de "Cedefop" en Grekio, ĉe http://www.cedefop.europa.eu/EN/ , vidu http://www.trainingvillage.gr .

Gravaj publikaĵoj:

Úvod do technológie vzdelávania. Nitra: SAIS Nitra & PF UKF, 1997.

K niektorým problémom efektívnosti vzdelávania. Nitra: PF UKF, 1999.

Terminológia technológie vzdelávania. Nitra: PF UKF, 2001.

Súčasnosť a perspektívny rozvoj technológie vzdelávania v Slovenskej republike. In Kol. Teoretické východiská technológie vzdelávania. Nitra: SAIS& PF VŠPg, 1996.

Kvantitatívne meranie efektívnosti dištančného štúdia. In Trendy v e- learningu. Konferencia BELCOM´05. Praha : ČVUT, 2005, s. 57- 66

Korekcia učebných deficitov pomocou diagnostiky autonómneho učenia a regulačných programov. In Mechlová, E. (ed). Information and Communication Technology in Education. Ostrava: Ostravská univerzita, 2005. s. 98- 102.

Technológia vzdelávania v historickom kontexte. In Kapounová, J. (ed). Od programovaného učení k e-learningu. Ostrava: Ostravská univerzita, PdF, 2005. s. 147-155.

Štúdie na tému etika a rómska problematika. Nitra: PF UKF, 2002.

Postavenie a rola rómskej ženy v spoločnosti. II. Štúdie. Trnava: UCM 2005.

Komunikační, informační a marketingové kompetence (úvodní studie k projektu). Ostrava: Ostravská univerzita, 2006.

Mediálne kompetencie. Úvod do problematiky mediálnych kompetencií. Zväzok I. Trnava: Fakulta masmediálnej komunikácie UCM Trnava, 2006.

Mediálne kompetencie a konkurencia v informačnej spoločnosti. En: Pavlů, D. et al. 2007. Marketingové komunikace a konkurence. Zlín: Univerzita Tomáše Bati, 2007.

Mediálne zobrazovanie tém o vzťahu štátu a katolíckej cirkvi. En: Človek a spoločnosť, roč.10, č.2, 2007. Košice: Spoločenskovedný ústav SAV. (http://www.saske.sk/cas/2-2007/index.html)

Efektivní sociálně-mediální komunikace. Ostrava: Ostravská univerzita, 2008.

Etika - praktická filozofia masmediálnej komunikácie. Trnava: FMK UCM Trnava, 2008.

Vybrané problémy metodológie masmediálnych štúdií. Trnava: FMK UCM Trnava, 2009.

Danĝeraj limoj de disvastigado de informoj pere de interreto En: 15-th International Congress on Cybernetics. Namur: Association internationale de Cybernétique, 1998, p. 740-744.

Zur Kohärenz des Grundlehrestoffes der Kommunikationskybernetik, insbesondere der Bildungskybernetik. En: Grkg /Humankybernetik 40/1999/1, p. 3-14. Paderborn: IfK.

Planungsbeiträge zur kommunikationskybernetischen Terminologiearbeit / Kontribuoj al la planado de la komunikadkibernetika terminologilaboro. En: Grkg /Humankybernetik 40/2001/1, p. 46-62. Paderborn: IfK.

Sprachregelungsprobleme für eine Europische Universität. En: Piotrovski, S./ Frank, H.(eld.): Europas Sprachlosigkeit. München: Kopaed, 2002, p. 228-237.

Klerigteknologio,informaci-komunikadaj teknologioj kaj fakterminologio. En: Grkg /Humankybernetik 46/2005/1, p. 20-26. Paderborn: IfK.

Evoluo de la scienco kaj komunikadproblemoj. En: Preradovič, L. (eld.): Eblecoj kaj limigoj de integrigo de la landoj de Danubio. Banja Luka: Mogučnosti i ograničenja integracija zemalja Podunavla, 2004, p.16-22.

Measurement of effectiveness in distance study. In Technika – Informatyka – Edukacja 2005. Teoreticzne i praktyczne problemy edukacji informaticznej. Rzeszów: Universytet Rzestowski, Instytut Techniki, 2005, p. 126-133 .

Acces to Information trough Communikation on the Web. En: Petrospektiva naučne misli i vizije razvoja architektonsko-grabeninskog fakulteta v Baňjaluci. Banja Luka, 2006, p. 439-446.

Ethik, Wissenschaft und methodologie in der Modernen Gesellschaft. In Uloga u značaj nauke u savremenom društvu. Banja Luka: Mogučnosti i ograničenja integracija zemalja Podunavla, 2007. p. 10- 21.

Mezurado de efektiveco de distanca studado

de Eva POLÁKOVÁ, Univerzita Sv. Cyrila a Metoda v Trnave (SK)

1. Enkonduko: elektita paradigmo, starigo de nocioj

Nocioj kiel kvalito, efikeco kaj efektiveco de klerigado estas nuntempe aktualaj ne nur ĉe profesiuloj, sed ankaŭ ĉe laika publiko, antaŭ ĉio lige al organizado de diversaj formoj de eksterna kaj distanca klerigado. Post la komenca entuziasmo dum enkonduko de tiuj ĉi formoj sekvis certa skeptikeco, ĉar montriĝis, ke altaj investoj bezonataj por enkonduko de necesaj teknologioj kaj neeviteblaj kostoj kaŭzataj de produktado de instrumaterialoj kaj realigado de la nova formo de klerigado ne ĉiam korespondas al antaŭvidata kvalito de atingitaj lernrezultoj. Tial oni multe pli atenteme sekvas mezuradon de efikeco, efektiveco kaj kvalito en alternativaj formoj de klerigado.

Nocioj de kvalito, efikeco kaj efektiveco de kleirgado kaj iliaj unuopaj elementoj estas komprenataj tre diverse, precipe en kunteksto de uzado de diversaj metodoj kaj elektronikaj rimedoj en eksterna, distanca klerigado, tial necesas difini la eliran esploran paradigmon. En pedagogio, kiel supozas J. Průcha (2002) oni ne povas paroli pri unueca paradigmo, sed spite al malsameco de opinioj ekzistas ĉi tie iuspeca ĉefa fluo de scienca laboro alproksimiĝanta al pozitivismo, pliriĉigita per elementoj de aliaj, konkurencaj paradigmoj. Enkadre de scienca pluraleco oni en pedagogio komencas pli ofte praktiki la principon de komplementeco de du sciencaj kulturoj – scienceca kaj humanisma, ankaŭ surbaze de sistema aliro. En ĉi kontribuaĵo oni eliros el principoj de novfunkciismo, ĉar dum la esploro oni mezuros per objektivaj matematikaj metodoj.

Pri pli larĝa enhavo de nocioj elvolviĝo, efikeco kaj efektiveco okupiĝas en pedagogio kleriga aksiologio aŭ pedagogia elvolviĝo. Tiun ĉi oni ĝenerale komprenas kiel *teorion* de takseblaj kaj mezureblaj pedagogiaj fenomenoj kaj samtempe kiel *metodologion* de tiu ĉi taksado. Se oni prikonsideras la metodologion, ĝi estas komprenata kiel aro da specifaj procedoj, metodoj, teknikoj kaj profesiaj konvencioj determinantaj, kiuj manieroj de taksado estu uzataj por plenumi kriteriojn de ekzakteco (ekz. kiel oni eksciu pri konoj de studentoj helpe de specialaj testoj kaj aliaj rimedoj).

Ĉar teorio kaj metodologio de pedagogia elvolviĝo operacias per precizaj instrumentoj de taksado, per metodoj de kvanta analizo de datenoj, estas la elvolviĝo kutime kunigata kun mezurado. Tial ene de pedagogio evoluiĝis ankaŭ speciala kampo nomata edukometrio. Ĝia tasko estas mezuri efekton de instruado surbaze de testoj (Byčkovský 1983; Komenda-Mazuchová 1995). Temas pri mezurado de rezultoj, t. e. pri mezurebla pedagogia elvolviĝo, konsistanta el komplekso da metodikaj aliroj kaj metodoj celantaj objektivan, eventuale objektivigitan pritakson, resp. mezuradon de diversaj pedagogiaj okazaĵoj, procedoj, rezultoj kaj efektoj de klerigado. La nociojn „rezultoj kaj efektoj" oni komprenas en la senco de difino de Průcha (2002, p. 364-365).

La rezultoj de edukiĝo (aŭ: de klerigado) estas karakteriziloj de senperaj ŝanĝoj, kiuj ekestas en la flanko de edukataj (klerigataj) subjektoj per efikado de certaj kurikularaj enhavoj. Tio estas rezultoj en la formo de kognitivaj, kognitivo-motorikaj kaj kognitivo-afektaj kvalitoj. Efektoj de edukiĝo estas konsekvencoj, elvokitaj ĉe unuopuloj kaj en la tuta socio per efiko de rezultoj de edukiĝo. Efektoj de edukiĝo havas longdaŭran karakteron, iam eĉ dumvivan daŭron kaj oni povas ilin nur malfacile ekzakte malkovri kaj mezuri.

Pli precizaj ol elvolviĝo estas pli detale starigitaj nocioj *efektiveco*, mezurata per konformo al starigitaj kriterioj kaj *efikeco* kiel matematika esprimo de kvociento de rezulta efekto al eldonitaj elspezoj – fontoj. En klerigado oni prikonsideras en rezulta efekto du aspektojn: ekonomian kaj socian, ambaŭ samvalore en meztempa kaj longtempa horizonto. Inter la elspezoj eldonitaj por klerigado troviĝas:

- Tutsociaj elspezoj por klerigado (ekzistas ligo de reciproka influado inter tiuj ĉi elspezoj kaj brutta ekonomia produkto)
- Elspezoj por kleriga sistemo (inkluzive de ties modernigo kaj renovigo)
- Konkretaj elspezoj por preparo de kvalifikitaj laborantoj (diferencigita laŭ unuopaj ŝtupoj kaj tipoj de preparo), diversaj investaj elpezoj por klerigado kiel salajroj k. a. (Poláková 1999).

El pozicio de la menciita paradigmo estas difinata efikeco de kleriga sistemo kiel:

- diferenco inter enira kaj elira statoj de kleriga sistemo
- kvanto de energio elspezita por atingo de kleriga efekto, t.e. ŝanĝo de stato de sistemo kun minimumaj elspezoj por kvanto de informoj, energio kaj tempo.

Efektiveco de kleriga sistemo (aŭ de ties unuopaj komponantoj) estas esplorata el la vidpunkto de plenumo de la sekvaj kriterioj:

1) Kiomgrade la sistemo kapablas realigi la postulatajn celojn.
2) Kiaj estas la mallongtempa kaj la longtempa rezultoj de klerigado el la vidpunkto de „globala edukiĝo" de la klerigato, t. e. komplekso de aliroj kaj kvalitoj, konoj kaj scipovoj de la subjekto (per komparado de enira kaj elira statoj).
3) Kia ŝanĝo okazis en kvalitaj kaj kvantaj parametroj de klerigado:
   a) en kvanto da informoj, instrukcioj, ripetoj, operacioj k.s. bezonataj por atingo de la celo
   b) en psikologiaj karakterizaĵoj – daŭro kaj intenso de la postulata agado, ŝarĝo, laciĝo, energi-elspezo k.t.p.
   c) en subjektaj travivaj karakterizaĵoj (emocioj, aliroj k.s.)
4) Kiaj estas kostoj de klerigado.

2. Kvantaj metodoj de mezurado de efektiveco kaj efikeco de klerigado

Se oni volas objektive esplori efektivecon de klerigado, oni devas observi ĝin el diversaj vidpunktoj:

- pedagogia (pedagogia efektiveco)
- ekonomia (ekonomia efektiveco)

- socia (socia efektiveco)
- individua (efektiveco de unuopulo)
- de kleriga sistemo (efektiveco de klerigaj institucioj)
- de kleriga procezo (efektiveco de klerigado)
- rezulta efekto (rezulta efektiveco de klerigado) kaj simile.

Ĉiukaze, la esploroj de efektiveco de klerigado je la fino koncentriĝas precipe al mezurado de la rezultoj de klerigado (t.e. de tio, kion la klerigato lernis) en la kampo de konoj, scipovoj kaj afektaj kvalitoj de lernantoj/studentoj, alivorte temas pri kvanto de atingitaj afektaj, kognitivaj, psikomotorikaj kaj kreaj celoj. Ne ĉiujn inter ili eblas objektive pritaksi per mezureblaj kriterioj kaj standartoj, difinitaj en la nocioj de efekto (helpe de respondoj, solvado de taskoj, rezultoj de agadoj). En la sekva parto estos pli detale analizataj nur kvantaj aliroj al mezurado de efiko de klerigado.

2.1. Efikeco kiel ekonomia kategorio

Oni povas difini ĝin per tre ĝenerala rilato:

$$\text{Efikeco} = \frac{\text{eliro}}{\text{eniro}} = \frac{\text{efiko}}{\text{enspezoj}}$$

Efikecon oni povas pligrandigi per altigo de eliroj dum konstantaj eniroj, malaltigo de eniroj dum konstantaj eliroj, ŝanĝo de ambaŭ grandoj kun celo atingi optimuman efikecon el la vidpunkto de tempo, energio kaj rezultoj.

Per tiu ĉi temaro okupiĝis jam en la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento Kamiač (1971), kiu kvante analizis ĉiujn kategoriojn de ekonomia efikeco de klerigado. Surbaze de teoria aliro al metodika solvo de pritakso de efikeco de klerigado li ellaboris metodikon de mezurado de objekta efikeco. Metodoj, kiujn li mencias (ne nur liaj propraj, sed ankaŭ de eksterlandaj aŭtoroj, ekz. de Strumilin, Kovács, Lej, Denison, Becker) estas uzeblaj ankaŭ nuntempe.

2.2. Efikeco kiel kleriga kategorio

a) *Se oni operaciigas konojn kaj scipovojn de studentoj*, oni devus mezuri inkrementon de klerigo (w), kiun oni ricevas el la kvociento de komenca kompetenteco (u_0) kaj fina kompetenteco (u_d). Tiu ĉi inkremento de klerigo (konoj) eksponencie kreskas depende de la instrutempo d (de instruado, lernado) kaj kun koeficiento λ de lernfacileco (Frank 1992): $w = e^{\lambda d}$

En praktiko oni povas mezuri la kleriginkrementon (w) per koeficiento de nombro da eraroj faritaj en antaŭtesto (u_0) kaj posttesto (u_d): $w = \frac{u_0}{u_d}$.

Dum tiu ĉi kvanta starigo de efikeco ekzistas krom la tri bazaj postuloj, kiuj devas esti dum la mezurado precize starigitaj, nome: kondiĉoj de efekto, mezurado de efekto (ĉikaze per testado) kaj normo de efekto, ankaŭ kondiĉo de objektiveco de produktado kaj taksado de uzataj testoj.

En objektoj kun kognitiva enhavo de instruado, kiun eblas operaciigi, dum elekto de instruaj taskoj plej bone taŭgas ilia klasigo apogata je la Niemierka taksonomio de instruceloj (Niemierko 1979):

I. nivelo de instruado – memorigo de informoj (scioj)

II. nivelo de instruado – kompreno de informoj

III. nivelo de instruado – apliko de informoj (uzado de scioj) en tipe lernejaj situacioj – solvo de tipaj lernejtaskoj – specifa trasfero

IV. nivelo de instruado – aplikado de informoj en problemsituacioj – nespecifa transfero.

En la testo kompreneble devas laŭproporcie troviĝi ĉiuj tipoj de demandoj – taskoj, korespondantaj al la menciitaj celoj.

b) *Por pritaksado de efikeco de la instrumetodo* kaj pritaksado de kleriginkremento de studentoj oni povas uzi ankaŭ la formulon de G. Huber (Petlák 2000, p. 60-62), en kiu temas pri procenta elkalkulo de tio, kion la studento devis alproprigi al si kaj kion li alproprigis.

por individuo (studento): $E_{post} = \frac{V_{post}}{V_{max}}.100$

por grupo da studentoj: $E_{skup} = \frac{\sum_{n}^{N}\left(\frac{V_{post}}{V_{max}}.100\right)}{N}$

V_{post} estas rezulto akirita post la instruado, eksciita per testo post la instruado, V_{max} estas la plej granda akirebla rezulto, sed ĝi ne diferencigas tion, kion la studento antaŭe sciis, de tio, kion li lernis. Por diferencigo oni devas uzi formulon:

por individuo (studento): $E_{štud} = \frac{V_{post} - V_{pre}}{V_{max}}.100$

por grupo da studentoj: $E_{skup} = \frac{\sum_{n}^{N}\left(\frac{V_{post-pre}}{V_{max}}.100\right)}{N}$

V_{pre} estas konoj antaŭ la lernado, eksciitaj pere de antaŭtesto.

Per matematika adapto de la formulo (dekalkulo V_{post} de V_{max}) oni ricevos esprimon de la veraj konoj de studentoj:

por individuo (studento): $E_{štud} = \frac{V_{max-pre}}{V_{max-pre}}.100$

por grupo da studentoj: $E_{skup} = \frac{\sum_{n}^{N}\left(\frac{V_{post-pre}}{V_{max-pre}}.100\right)}{N}$

3. Mezurado de efikeco en elektronikaj formoj de distanca studado

Ofertantoj kaj uzantoj de elektronikaj formoj de distanca studado deziras scii, kia estas ilia efikeco. Perkomputila lernado havas en tiu ĉi kazo kompare al klasikaj formoj kaj metodoj klarajn avantaĝojn ĝuste en la eblo de objektigita (en la senco de nepersona, tial pli objektiva) taksado de la efekto de studentoj kaj tiel ankaŭ en mezurado de la efikeco de kleriga produkto. Modernaj interretaj teknologioj ebligas efektivigi ankaŭ realigon de didaktika testo en elektronika formo, kio alportas novajn metodojn de testado. Signifo de elektronika testado de konoj kreskas kun kreskanta nombro da studentoj, kun postioma enirado de distanca klerigado kaj perkomputila lernado en klerigprocezon kaj ĝi iĝas necesa precipe tie, kie oni postulas certan kvanton kaj kvaliton de konoj dum transiro al nova unuo de la studata problemaro. Ĉar perkomputila lernado estas plej multe uzata en universitata kaj postgrada, ev. rekvalifika studado, oni observu ties kvaliton.

Observado de sukceso de universitataj studentoj montras, ke la plej grandajn problemojn havas studentoj en la unua semestro, resp. en la unua studjaro, do en la tiel nomata adapta fazo. Depende de la postuloj de la elektita fako, ĝis 30% da studentoj forlasas la studadon jam post la unua, eventuale en la dua studjaro. La kaŭzo estas, ke la studentoj ne posedas lernkompetentecon sufiĉan je la postulata nivelo, kaj krome, ke la gravcentro de la preparo ŝoviĝas en la direkton de la aŭtonoma lernado sen evidenta kontrolo kaj rekta gvidado de instruisto.

Kiel bazaj kaŭzoj de tiu ĉi okazaĵo povas esti konsiderataj:

- pliprofundigo de deficito de konoj kaŭzita per nesufiĉa aŭ manka postprelega prilaborado de la prezentita instruaĵo
- akirita deficito de certa parto de kohera enhavo de instruaĵo malebligas alproprigon de sekvaj partoj de la enhavo
- kresko de subjektiva opinio pri la malfacileco de la instruaĵo, kiu malebligas progreson de la lernado.

La studentoj ne konsciiĝas, ke "kompreni" ankoraŭ ne signifas memorteni, nek akiri la postulatan kompetentecon. La studado do signifas ne nur akcepton de informo, sed precipe ĝian ripeton, reproduktadon, ekzercadon kaj aplikadon.

La fakto, ke nur ĉ. 10% el tio, kion ni perceptas, restas konservita en nia memoro, kaj ke la aperceptata informo ne estas plialtigebla per altigo de informfluo (bv. observi kelkajn informacikibernetikajn modelojn[1]), signifas por la pedagogio fundamentan limigon. La progreso en la lernado estas tial atingebla nur pere de ripetado kaj ekzercado, do per prezentado de la identa enhavo en diversaj formoj de kodigo kaj dum daŭra kontrolo – per informiĝo, kion oni jam ellernis kaj kion ankoraŭ ne.

Surbaze de ĝisnunaj spertoj kun apliko de prototipoj de multperilaj instruaj kursoj estas observataj ĉe studentoj dum memstudado jenaj tendencoj:

- nekritika memtaksado de daŭro de la propra studado
- supraĵa "surfado" en la studata enhavo sen kompreno de internaj rilatoj kaj principoj.

[1] Ekz. Frank 1969/2, Frank 1999/2

Konstato, ke studentoj "surfas", aplikante la multperilan komputil-lernadan metodon simile kiel en interreto, signifas, ke ili ekhavas kutimon de supraĵa, nesufiĉa akirado de konoj. Tiuj ĉi poste ne sufiĉas por solvo de problemoj, kiujn la studentoj renkontos en la praktiko. La konsekvenco estas malpli granda efiko de la distanca studado kompare kun la klasikaj formoj de instruado, dum kiu oni uzas diversajn metodojn de kontrolo de konoj kaj zorgas pri forigo de konstatitaj deficitoj.

3.1. Maniero de studado en la medio de perkomputila lernado

Distanca klerigado reprezentas individualigitan formon de instruado kun alta aplikado de multperilaj elementoj, en nuntempo kun pli kaj pli granda uzado de metodo de perkomputila lernado. Perkomputilan lernadon oni povas rilate al bezonoj de distanca klerigado difini kiel peradon de la enhavo de certa instruobjekto pere de akireblaj elektronikaj periloj, inkluzive de interreto, intrareto, CD-ROM diskoj, kiuj estas nuntempe ankoraŭ uzataj paralele kun elektronikaj lernolibroj, eventuale ankaŭ kun presitaj instrumaterialoj.

Ĉar ĝuste ĉi tie la sukceso de studado dependas de la nivelo de memreguligo kaj de evoluigita kapablo de aŭtonoma lernado, estas necese, ke la studado estu certigita per bonkvalitaj instruaj rimedoj. Kvanta evoluigo de perkomputilaj lernaplikadoj tamen ne korespondas al ilia kvalito, kiu tre ofte postrestas post la bezonoj de distanca studado. En la plej multaj aplikoj mankas la retrokuplado, ebliganta al la studentoj memreflekton de la studadprocedo kaj kontrolon de kvalito de la akiritaj konoj, aŭ ĝi ĉeestas nur en minimuma kvanto. Ĉiam ankoraŭ ekzistas plejmulto da lernapogiloj, kiuj enhave estas identaj kun lernolibroj uzataj en klasika instruado, nur kun la diferenco, ke ili troviĝas sur iu elektronika portilo.

Kvalito de instruaj materialoj por tiu ĉi formo de studado estas starigata per:

- prezentata enhavo depende de la malfacileco de la teksto
- prezentata formo, optimume aplikanta principon de demonstreco
- ĉeesto de retrokuplado, kiu ebligas korekton de eraraj statoj dum memstudado

En kondiĉoj de distanca studado, se ĝi ne estas realigata en iu profesia institucio, kiu komplekse prizorgas ĉiujn funkciojn de studado, estas por la helpinstruantoj tre malfacile certigi la monitoradon de procedo de memstudado kaj forigon de studaj deficitoj de la studentoj. Tio tamen estas bone akirebla dum la propra produktado de studaj apogoj.

3.2. Ekskurso en historion

Problemo de lernaj deficitoj kaj nesufiĉa lernkompetenteco komencis esti solvata en la sesdekaj jaroj pere de kreado de unue linearaj, poste branĉigitaj programoj enkadre de pedagogie kibernetika movado de programita instruado. Validiĝis ĉi tie ĉefe principo de malgrandaj paŝoj kaj retrokuplado. En plua evoluigo de instruprogramoj gravis la principo de adekvateco: al studentoj estis prezentataj problemoj adekvataj al ilia aktuala lernstato kaj la ŝtupo de malfacileco postiome altiĝis ĝis la limo de ebla efekto de individuo.

En la okdekaj jaroj ekestis enkadre de movado por komputile apogata instruado t. n. gvidaj programoj, kiuj estis produktitaj por apogi instruadon helpe de kutima lernolibro (Weltner, 1978). Tia maniero de lernado signifis por la studento alternadon de memregulada faro kun la fazo regulata de ekstere. Standarta lernolibro estis la primara fonto de informoj (dum ĝia uzado la studento mem organizis sian lernadon), la gvida programo helpis al li, laŭ lia propra elekto, dum memkontrolo, ĉe nekompreno de la instruaĵo, ĉe evoluado de lernkompetenteco kaj ĉe altigado de lernemo.

Gvidaj programoj estis kreataj por konkretaj lernolibroj, nome por ties certaj taŭgaj partoj aŭ ĉapitroj laŭ jenaj paŝoj (Weltner, 1994, p. 114):

1-a paŝo, kreo de listo de
- novaj faktoj
- novaj nocioj
- novaj operacioj

2-a paŝo, formulado de taskoj, demandoj kaj ekzemploj rilate al:
- faktoj
- nocioj
- novaj operacioj

3-a paŝo: demandoj kaj taskoj estas vicigataj laŭ la grado de malfacileco.

Jam surbaze de tiu ĉi tre konciza superrigardo oni konstatas, ke teorioj de programita instruado estas aktualaj ankaŭ hodiaŭ, minimue kiel bazo de kreado de didaktikaj perkomputilaj aplikoj.

3.3. Nunaj ebloj de solvado

Kiel ŝlosilaj faktoroj de kvalito de universitataj multperilaj instruaj aplikoj, kiuj povus ebligi pli bonan kvaliton de aŭtonoma lernado en kondiĉoj de distanca studado, povas esti konsiderataj

- certigo de retrokuplado kaj memregulado (t.n. diagnozaj kaj gvidaj elementoj de eksperta sistemo), kiuj ebligas al la studentoj kontroli la ŝtupon de alproprigo de la studata problemaro, inkluzive de korekto de nedezirataj statoj
- kohera strukturo de enhavo ebliganta alproprigon de kompleksaj, neizolitaj konoj
- eblo ekzercadi solvojn de simulataj problemoj el praktiko.

Unu el la ebloj, kiel kontraŭi la nedezirataĵn aspektojn de la studado kaj solvadi la ĵus menciitajn problemojn, estas realigo de retrokuplado helpe de "etaj reguligaj kaj ekzercaj programoj" – elementoj de eksperta sistemo, kiuj estas partoj de instrua aplikado. Temas pri malgrandaj enigitaj ekspertaj sistemoj. Oni povas karakterizi ilin kiel komputilajn programojn simulantajn decidan aktivecon de eksperto dum solvado de komplikaj, probleme orientitaj taskoj, uzantaj taŭge koditajn specialajn konojn de la eksperto, kun la celo atingi kvaliton de decidado sur la nivelo de la koncerna eksperto.

La plej grava elemento de la eksperta sistemo estas tiel nomata *bazo de konoj*. Dume en "klasikaj" programoj estas la konoj de ekspertoj disigitaj en unuopaj programaj instrukcioj, kiuj estas aplikataj en antaŭe starigita vicordo, ĉe ekspertaj sistemoj ili estas

eksplicite esprimitaj en la formo de memstara komplekso, nomata bazo de konoj, kaj antaŭe estas donata nur strategio de uzo de konoj el tiu komplekso. Ĝia kvalito antaŭdeterminas kvaliton de la tuta aplikado de la eksperta sistemo. En tiu ĉi kazo temas pri varianto de diagnozaj ekspertaj sistemoj, kiu kapablas identigi la nunan staton de la problema domeno, t.e. de kvalito de aŭtonoma lernado aŭ de ekzistanta studadproblemo.

Klopodo de la aŭtoroj de eksperte konsiderataj "reguligaj kaj ekzamenantaj" komponantoj estas enigi la taŭgan ekspertan sistemon en "tegmentan" multperilan instruan aplikadon tiel, ke eblus atingi kompletan kunfandiĝon de la superanta aplikado kaj enigita eksperta elemento, per kiu eblos:

- konsistenco de la tuta solvo el la vidpunkto de uzantoj
- transdono de parametroj kaj variabloj inter ambaŭ aplikadoj, t. e. inter tegmenta multperila instrua aplikado kaj la enigita eksperta sistemo (Vostrovský, 2002).

Tiuj ĉi kriterioj komplete ekskludas uzon de malplena eksperta sistemo en ĝia klasika formo kaj ĝian plenigon per postulataj konoj, ĉar tia solvo signifas kompletan izoligon de la eksperta elemento el la vidpunkto de transdono de parametroj inter ambaŭ aplikadoj. Temas antaŭ ĉio pri transŝalto de la procedo post trovo aŭ diagnozado de stato aŭ kaŭzo en konkreta teoria parto de instrua multperila aplikado, pli detale klariganta la starigitan problemon. Estas taŭge programi la ekspertan elementon helpe de rimedoj de la uzita multperila instrumento, ĉar la plejmulto da ili jam disponas pri interna programlingvo (ekz. Action Script kaze de rimedo Macromedia Flash, HTML), kiu ofertas sufiĉan skalon da ordonoj kaj funkcioj por realigo de tiaj elementoj.

Ekspertaj programoj estas kutime situataj je la fino de ĉiu ĉapitro kun la celo korekti nedeziratan kontinuon de la studado per reveno al koncernaj partoj (sekvencoj) de la prezentata ĉapitro. Tamen, mala sinsekvo en la uzado de ekspertaj sistemoj ŝajnas esti pli efika: la uzanto difinas la problemon, kiun li renkontis dum la memstudado kaj nur poste oni ofertas al li ekspertan solvon.

Aplikado de la eksperta sistemo en perkomputila lernado difinas specifan problemon, taskon ktp., kaj instigas la studenton fari solvon, kiun la sistemo kontinue pritaksas. Samtempe oni uzas la klarigan mekanismon de ekspertaj sistemoj, kiu eventuale klarigas la faritan eraron al la studento. En la kazo de bazaj eraroj, la studento devas reveni al nesufiĉe trastudita temo. Tiamaniere estas la rektlinia supraĵa studado ĝenata per eksperta sistemo, kiu malebligas al la studento daŭrigi (transiri al la sekva ĉapitro) tiom longe, ĝis la problemaro estos posedata sur sufiĉe kvalita nivelo.

Klaras, ke la ekvilibra elemento dum altigo de efektiveco estas certigo de optimuma retrokuplado, kiu realiĝas per ekzamenado. Tradicia neefektiva pritaksado de studentoj komencas esti anstataŭigata per didaktikaj testoj en elektronika formo (programa ekipaĵo por testado de konoj kun uzo de interretaj teknologioj), ĉar ĝi forigas multajn malavantaĝojn de buŝa ekzamenado, krom foruzo de tempo de la instruisto por produkti la teston. Al la plej grandaj oportunoj de elektronika testado apartenas ekzemple tio, ke ĉiu studento povas ricevi sian propran version de la testo, tiu ĉi estas prompte korektita kaj pritaksita, la rezultoj estas storataj en databazo k.s..

Kvaliton kaj objektivecon de la taksado povas konsiderinde plialtigi efika kaj unueca informa sistemo, por kies aplikado tamen ofte mankas objektivaj direktivoj dum sekvado kaj pritaksado de klerigaj rezultoj de studentoj. Sed, tiu ĉi progama kampo estas tre facile kombinebla kaj kompletigebla per matematikaj instrumentoj, kiuj rekte validigas ne nur efikecon de unuopaj elementoj, sed ankaŭ de la kompleta produkto. Kontraste al tio, ĉiuj nuntempe uzataj programaraj kampoj, en kiuj estas realigata perkomputila lernado, enhavas arojn da retrokupladaj testoj kaj da aliaj taksantaj instrumentoj por la lernanto. Malgraŭ tiuj ĉi teknologiaj ebloj oni dum uzado de ajnaj pritaksaj rimedoj en la praktiko renkontas alian problemon: Kiel prikonsideri individuajn premisojn de la studado? Ankaŭ ĉi tie oni povas trovi respondon helpe de kvanta metodo de *laboro kun premisoj*.

3.3.1. Esenco de la metodo de laboro kun premisoj

Alia maniero, kiel altigi la efikecon de la studado, estas apliko de la metodo de laboro kun studaj premisoj de la studentoj, dum kiu oni devas determini lernajn eblojn de ĉiu studento. Tio ebligas konstante kompari lian atingatan lernrezulton kun lia studa premiso (Benčo, 2002).

La konfronto montras, ĉu la studento laboras laŭ siaj kapabloj aŭ sub siaj kapabloj, ĉu li havas rezervojn en studlaboremo kaj kiom grandaj estas la rezervoj. La menciita metodo apogiĝas je jena baza hipotezo:

"*Se estas konata studa premiso esprimita kiel certa matematika espero pri studadrezulto de studento aŭ de grupo, tiam la vera efekto de studadrezulto konfronte al la premiso signifas diferencon, kiu rekte demonstras rezervojn en la studado*". Tiu ĉi hipotezo aperas en la formo

$PS - MS = R$ aŭ $PS = MS + R$ (1),

kie MS = studa premiso, PS = akirita sukceso, R = rezervoj en la studlaboremo.

Al la ĉefa hipotezo ligiĝas ankaŭ hipotezaj demandoj:

- ĉu la difino de la hipotezo korespondas al la matematika rilato

$PS = MS \,.\, A$ (2),

kie A esprimas nivelon de pozitivaj motivigoj kaj aktivecoj, kiuj determinas la rilaton al lernado

- ĉu el la bazaj rilatoj (1) kaj (2) eblas derivi pluajn karakterizilojn, kiuj povus helpi al diagnoza analizo de lernrezultoj.

Kiel videblas, la esenco de la metodo de laboro kun premistoj baziĝas sur ekzaktaj matematikaj kaj statistikaj metodoj, tial ĝi estas taksebla kiel alte objektiva.

4. Konkludo

Aŭtonoma lernado, kiu estas pezocentro de distanca studado, povas pliefektiviĝi kun subteno de eksperte korektata retrokuplado kiel unu el la eblaj solvoj de aplikoj de perkomputila lernado. Kvankam la kreado de priskribitaj lernapogiloj estas programe kaj fake – pedagogie temporaba, la farita elspezo revenos en la formo de pli granda

efikeco de la studado. Uzeblo kaj efikeco de tiuj ĉi lernaplikadoj povas iĝi tre gravaj precipe en jenaj kazoj:

- dum studado de t.n. ĉerandaj socio-ekonomiaj aktivecoj, kiuj ja estas neeviteble bezonataj, sed maloftaj (ekz. certaj specifaj konoj el la kampo de maŝinkonstruado, agrikulturo, medicino ktp.)
- dum studado de tiaj objektoj, kiuj suferas pri manko de pedagogoj kapablaj kaj bonvolaj prelegi pri la koncerna temaro
- en komencaj fazoj de universitata kaj distanca studado kiel efika rimedo de akiro de dezirata lernkompetenteco de studentoj
- en aktuala kompletiga studado neevitebla dum solvo de ekestintaj problemaj situacioj en praktiko.

Efikeco de klerigado dependas de implementado de certaj reguligaj procezoj de klerigo, nome helpe de optimumaj pedagogiaj-organizaj kaj materiaj dispozicioj servantaj por sekurigo de certaj korektaĵoj de kleriga procezo.

Se la socio volas uzi klerigadon kiel intensan faktoron de ekonomia kresko, oni devas ekscii, per kiaj manieroj, formoj, rimedoj, en kiu intenseco kaj en kiuj cirkonstancoj oni devas manipuli la klerigaton por atingi deziratan rezultan efekton de klerigado. Oni devas prognozi, kia speco de klerigo kaj en kiu kvalito estos optimuma por la socio. Plue oni devas havi imagon pri tio, kiajn elspezojn investi en klerigadon kaj ĝis kiu grado la investo de tiuj rimedoj estos efika. Tio ĉio antaŭvidas esploradon de laŭleĝaj vojoj de evoluo de klerigado same laŭkvalite kiel laŭkvante, precipe per ekzaktaj esploraj metodoj.

Literaturo:

Benčo, J. (2002): Ekonómia vzdelávania. Bratislava: Iris

Byčkovský, P. (1983): Základy měření výsledků výuky. Praha: SPN

Frank, H. (1999): Klerigkibernetiko/Bildungskybernetik. Nitra: SAIS

Frank, H. (1969^2): Kybernetische Grundlagen der Pädagogik. Baden-Baden: Agis

Frank, H. (1999^2): Klerigkibernetiko/Bildungskybernetik. KoPäd München & SAIS Nitra

Kamiač, A. (1971): Ekonomika vzdelania. Bratislava: Práca, 1971

Komenda, S. - Mazuchová, J. (1995): Tvorba a testování testů. Olomouc: Olomoucká univerzita

Marsh, H. W. - Roche, L. A. (1997): Making students´evaluations of teaching effectiveness effective. In: American psychologist, 1997, vol. 52, no.11, p. 1187 – 1197.

Niemierko, B.(1979): Taxanomia celów wychowania. Kwartalnik pedagogiczny, 24, 1979, 2, s. 67-78.

Poláková, E. (1999): K niektorým problémom efektívnosti vzdelávania. Nitra: Pedagogická fakulta UKF

Průcha, J. (2002): Moderní pedagogika. 2. přeprac. vyd. Praha: Portál

Stringer, M., Irwing, P. (1998): Students´evaluations of teaching effectiveness. A structural modelling approach. In: British journal of educational psychology, 1998, p. 409 – 426.

Štefančiková, A. (2003): E–learning – jedna z možností efektívnej výučby. In: IMEA 2003: zborník z medzinárodnej konferencie doktorandov, 1. vyd. Hradec Králové: Gaudeamus, p. 71 - 76.

Švec, Š. (2000): Teoreticko-metodologické základy andragogiky. In: Universitas Comeniana - pedagogika. Bratislava: Univerzita Komenského, p. 91- 130.

Picard, C. F. (1972): Graphs et questionnaires. Paris: Gauthier Villars

Poláková, E. – Štefančiková, A. (2004): New technologies in adult education. In: ICTE 2004. Ostrava: OSU, p. 46-51

Vostrovský, V. (2002): Expertní řízení průběhu e-learningu. In: E-learn 2002. Žilina: ŽU

Weltner, K. (1978): Autonomes Lernen – Theorie und Praxis der Unterstützung selbstgeregelten Lernens in Schule und Hochschule. Stuttgart: Klett

Weltner, K. (1994): Řídící programy a studijní podpory jako nástroje k posilování odborné a učební kompetence. In: Vzdělávací kybernetika ve výzkumu a výuce. Dobřichovice: KAVA-PECH

Ricevita 2010-09-19

Adreso de la aŭtoro: Doc. PaedDr. Eva Poláková, Phd. (OProf. - AIS, honor. Prof. - Sibiu), Fakulta masmediálnej komunikácie, Univerzita Sv. Cyrila a Metoda v Trnave. E-mail:eva.polakova@scc.sk

Messung der Effizienz des Fernstudiums (Knapptext)

Effizienz der Bildung oder der einzelnen Bildungskomponenten wird untersucht aus verschiedenen Gesichtspunkten und auf verschiedene Weise, in Abhängigkeit von verschiedenen Ausgangsparadigmen. In diesem Beitrag werden einige mögliche Methoden gezeigt, vor allem quantitative Ansätze, mit denen man die Effizienz des Fernstudiums untersuchen kann. Als Basis wird hier die objektivierte Messung der Eingangs- und Ausgangskenntnisse genommen.

Efficiency Measurement of Distance Studies (Summary)

Efficiency of education or of singular education components is explored under diverse points of view and in diverse manner, in dependency of diverse start paradigms. In this paper, several possible methods are presented, chiefly the quantitative approach, with the help of which the efficiency of distance studies can be measured. As a base is taken the objectivated measurement of start knowledge and exit knowledge.

grkg / Humankybernetik
Band 51 · Heft 4 (2010)
Akademia Libroservo / IfK

Ein dynamisches Entscheidungsmodell für ausgewählte Probleme in der Logistik

von Marc HANFELD, Thorsten CLAUS, Shahram AZIZI GHANBARI, Zittau (D)

Einleitung

Oftmals kommt es bei unternehmerischen Entscheidungen zu zeitlichen Interdependenzen. Dies ist dann der Fall, wenn in der Gegenwart zu treffende Entscheidungen den zukünftigen Handlungsspielraum beeinflussen. Ein solcher Umstand erfordert den Einsatz von dynamischen Entscheidungsmodellen. Diese Modelle bilden das ganze Unternehmen oder einzelne Unternehmensbereiche als System ab. Wichtig hierbei ist, dass die Dynamik eines solchen Systems und die Dynamik der Umweltzustände in geeigneter Weise Berücksichtigung finden. Damit liegt auf der Hand, dass man zu Untersuchungsmitteln greifen muss, die das System in seiner zeitlichen Entwicklung beschreiben können. Allgemein ist jedes System zur Entwicklung (Veränderungsbewegung) fähig, die z. B. durch eine Koppelung des Systems mit einer sich verändernden Umwelt angetrieben sein kann. In diesem Fall bilden die zeitlich geordneten Daten nicht nur eine Menge von Punkten im Zustandsraum, sondern haben das wesentliche Merkmal, dass genau diese Punkte über die Zeit miteinander verbunden sind. Sie bilden einen stochastischen Prozess ab. Dynamisch modellierte System besitzen den Vorteil, dass man nicht nur Aussagen über die Verteilung von Zuständen eines Systems treffen, sondern auch die Entwicklung eines Systems verfolgen und dadurch Aussagen über die Funktionsweise dieses Systems oder ganzer Klassen von Systemen erhalten kann. Dabei ist die Annahme grundlegend, dass sich dynamische Systeme in Abhängigkeit ihrer Umweltzustände entwickeln. Ist man in der Lage, diese Abhängigkeiten und Zusammenhänge zu erkennen, bedeutet das nicht nur einen Gewinn hinsichtlich des Verstehens solcher Systeme, sondern dies eröffnet auch neue wissenschaftliche Momente. Man ist nicht nur in der Lage, das System zum aktuellen Zeitpunkt deskriptiv zu beschreiben, sondern kann auch begründete Vermutungen anstellen, die den Verlaufsprozess des Systems zu verschiedenen Zeitpunkten beschreiben. Folglich besteht auch die Möglichkeit, auf die Entwicklung der untersuchten Systeme Einfluss zu nehmen und somit den Verlaufsprozess des Systems zu lenken. In diesem Fall bewegt man sich im Problemgebiet der Steuerung. Man benutzt „Kontrolle, d.h. Steuerung oder Regelung von Prozessen, um Abweichungen der Ist- von den Sollgrößen auszugleichen" (Lippe 1993, S. 379). Dabei können Ausprägungen der Zustandsvariablen als Sollgrößen auftreten. Diese Sollgrößen sind innerhalb des Entscheidungsmodells als Zielgrößen festzulegen.

Im ersten Teil dieses Artikels wird auf dynamische Modelle und Entscheidungsprobleme eingegangen. Im zweiten Teil werden wichtige Methodische Ansätze zur Lösung von dynamischen Entscheidungsproblemen kurz vorgestellt, voneinander abgegrenzt und Bezug auf deren Erweiterungen im Kontext spezieller betriebswirtschaftlicher Anwendungsfelder genommen. Im dritten Teil wird ein auf einer dieser Methoden basierender Ansatz vorgestellt, mit dem dynamische Entscheidungsprobleme unter Risiko-

einflüssen gelöst werden können. In Ergänzung dazu erfolgt die Demonstration dieses Ansatzes an einem einfach nachvollziehbaren Anwendungsbeispiel aus der Logistik.

Dynamische Modelle

Oftmals ist es einfacher, abzuschätzen, wie groß die Veränderung des Systemzustands in Abhängigkeit von gegebenen Zuständen ist als die Zustände zu unterschiedlichen Zeitpunkten selbst. Das Ergebnis dieses Modellierungsvorgehens ist eine Differenzengleichung (im zeitkontinuierlichen Fall eine Differentialgleichung) oder eine Folge in impliziter Form. Dazu vergleicht man zwei Systeme, die sich bis auf den Zustand zum Zeitpunkt t_0 nicht unterscheiden. Diese Systeme haben eine ähnliche Struktur und ähnliche Funktionsweisen. Ihre Entwicklung ist unabhängig vom Anfangszustand immer konstant. Formal kann das beschrieben werden durch:

$$\Delta x_i := x_{i+1} - x_i = c, \qquad x_i, c \in \mathbb{R}^n$$

Sei

$$x_{0,A} = a, x_{0,B} = b,$$

dann gelten

für das System A: $x_{i,A} = x_{0,A} + i \cdot c$ und

für das System B: $x_{i,B} = x_{0,B} + i \cdot c$.

Obwohl für beide Systeme gleiche Zustandsänderungsannahmen gelten und sich beide nach dem gleichen Entwicklungsgesetz verändern, nehmen sie doch zum selben Zeitpunkt in Abhängigkeit vom Anfangszustand verschiedene Zustände ein. Der Grund dafür liegt in der Fähigkeit des formalen Modells, schon in dieser einfachsten Ausführung die Geschichte eines Systems zu speichern. Die Speichertiefe selbst ist vom Grad der Differenzengleichung abhängig und entspricht der Anzahl der Anfangsbedingungen, die nötig sind, um eine Differenzengleichung eindeutig lösen zu können. Gleichungen dieses Typs sind geeignet, um Klassen von Systemen zu beschreiben, die sich in ihrer zeitlichen Entwicklung ähnlich sind.

